

Kurso pri tradukado al kaj el Esperanto gvidata de Claude Piron
en Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 619, 1975.08.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De la dimanĉo 13-a ĝis la sabato 26-a de julio disvolviĝis en la urbo La Chaux-de-Fonds kurso de tradukado al kaj el Esperanto, teorio kaj praktiko. Gvidis tiun ĉu dusemajnan studrestadon sinjoro Claude Piron, kies nomon konas la legantoj de la *Esperanta Antologio*. Sub liaj konsiloj ekzerciĝis en la traduk-arto 9 personoj venintaj ne nur el Svislando, sed ankaŭ el Francio, Hungario kaj Britio.

A.- S-ro Claude Piron laboris kiel tradukisto en Nov-Jorko je la servo de Unuiĝintaj Nacioj kaj poste en Ĝenevo je tiu de Monda Organizaĵo pri Sano. Entute 15 jarojn de sia vivo li tiel lertiĝis en la arto reverki francen tekstojn el aliaj lingvoj. Li lernis Esperanton, kiam li estis 11-jara, kaj en Nov-Jorko li fondis la Esperanto-Klubon de UN, kie rekontiĝas esperantistoj deĵorantaj en la granda vitra palaco ; kaj estas en la domo de Manhattan, ke li konatiĝis kun franca tradukistino, kiu fariĝis lia edzino. Hodiaŭ sinjoro Claude Piron instruas ĉe la faktultato de psikologio kaj eduksciencoj de Ĝeneva Universitato, sed li daŭre partoprenas kiel tradukisto la asembleojn de Monda Organizaĵo pri Sano, kiam ili disvolviĝas en Azio kaj Afriko. Lia kono de la ĉina kaj rusa lingvoj estas tre utila por la revizio de la protokoloj. En Esperanto Claude Piron ne nur verkis poemojn. Li tradukis aron da kantoj kaj kanzonoj el plej diversaj lingvoj : franca, angla, hispana, rusa, ĉina, jida, germana, ktp.

Cl.- Vi do konstatas, ke la unuan kurson de la starigata Internacia Feria Altlernejo gvidis ege kompetenta fakulo pri la tradukarto. Sub la nomo Internacia Feria Altlernejo, kies mallongigo estas IFA, Kultura Centro Esperantista provos organizi universitat-nivelajn kursojn, seminariojn kaj kolokvojn. Ĝi starigos sub la nomo Edmond Privat gastejon, kie la kursanoj kaj instruantoj povos loĝi je moderaj prezoj en ĉambroj, kiuj favoras la studemon. Tiom longe, kiam la ejoj necesaj al unu kurso ne estos finaranĝitaj, la kursoj, kiuj jam disvolviĝos, konservos eksperimentan karakteron kaj listiĝos en eksperimenta sesio de IFA.

A.- KCE instaliĝis en tre kvieta kvartalo borde de la urbo La Chaux-de-Fonds. La tradukkurso jam povis disvolviĝi en la du kurs-ĉambroj de KCE. Tiuj malgrandaj kunsidoj permesas aranĝi kunvenojn grupigantajn 10 personojn. Pro tio nur 9 personoj povis partopreni la unuan kurson de IFA. Tiom longe, kiam ni ne posedos pli grandajn kursĉambrojn, la IFA aktiveco limiĝos al la organizado de seminarioj grupigantaj naŭ partoprenantojn kaj 1 fakulon. La plej urĝa celo estas povi loĝigi ĉiujn tiujn personojn kun ties familianoj. Tuj kiam tiuj unuaj kondiĉoj estos kontentigitaj, tiam ni povos publike malfermi la unuan kurssesion de IFA, kies studrestadoj disvolviĝos laŭ programvico da plej diversaj aranĝoj dum la feriaj periodoj.

Cl.- Ni revenu al nia tradukkurso. Ĝi disvolviĝis laŭ la ĉisekva horaro. La lundojn, merkredojn kaj vendredojn okazis matene tri lekcioj kaj posttagmeze aliaj tri lekcioj. Marde kaj ĵaŭde lekcioj disvolviĝis nur la matenon. Tiel entute la kurso konsistis el 48 lekcioj, kio respondas al universitata semestro por studfako.

A.- Unu el la liberaj posttagmezoj estis ĉiusemajne dediĉitaj al komuna ekskursado, kiu finiĝis per komuna manĝo. Sabate kaj dimanĉe ne okazis oficialaj aranĝoj. Ĉiu povis ripozi aŭ ekskursi laŭ la propra emo.

Cl.- Por eviti, ke persono kun nesufiĉa lingva kono partoprenu la kurson, la aliĝantoj devis prezenti prov-tradukojn. Tamen la kursanoj ne formis homogenan grupon. Ne ĉiuj regis la gramatikajn regulojn de Esperanto. Pro tio la venontan jaron la aliĝantoj al la dua tradukkurso, kiun denove gvidos s-ro Claude Piron, devos ankaŭ respondi al testo, kiu permesos malkovri ĉies mankojn kaj proponi al ĉiu akceptito antaŭajn ekzercoj. Vi sciu, ke tiu dua kurso refoje havos enkondukan karakteron. Nur kiam sufiĉe da personoj estos sukcese frekventintaj enkondukan kurson, tiam ni povos organizi pli altnivelan kurson.

A.- Kelklaj esperantistoj sin demandis, kion oni povas fari dum dusemajna kurso dediĉita al la tradukarto. Por ili la venontan semajnon ni donos rapidan priskribon de la instruado kaj laboro, kiuj karakterizis la unuan kurson. Povu tiu ĉi priskribo doni al vi emon foje veni al La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Tiu ĉi urbo montriĝis tre agrabla feriloko. Unue la kursejoj troviĝas en tre kvieta kvartalo kun ĝardenoj kaj multaj arboj. En kelkaj minutoj de marŝado oni troviĝas ĉu en la urbo, kie restoracioj permesas manĝi je tre moderaj prezoj, ĉu en paŝtejoj, kie aŭdiĝas la sonorilado de bovinoj.

A.- La infanoj ne enuis. Bestĝardeno, vivario kun serpentoj, konkursejo, naĝejo, sketejo kaj interesaj muzeoj ilin allogis, same kiel la ĉirkaŭaĵo de la urbo kun siaj montoj kaj arbaroj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!